An "Outline of Esperanto" and a short lesson in its grammar were given by Mr. BERNARD LONG, B.A., and the meeting came to an end with the singing by the audience of "La Alvoko" and "Vivu la Reg!" There was an interesting display of Esperanto literature in the adjoining hall and a large number of propaganda leaflets were distributed. An audience of about 400 enthusiastically testified its appreciation of the objects of the meeting and of the various items of the programme. Thanks are due to the many devoted workers whose efforts made the meeting a success, and especially to the organisers, Mr. Geo. J. Cox and Mr. C. H. Edmonds.



Libraro kaj Gazetaro.

Esperanto Shorthand.—The Committee formed to publish Mr. R. M. C. Butler's system of Esperanto Shorthand are very pleased to be able to announce that

the work is now being sent to the printers. It is hoped that the book will be ready in a month or two. Secretary to the Committee:—P. J. CAMERON, 69, Schubert-road, Putney, London, S.W.15.

Gazetoj Ricevitaj.—*Bulteno de H.C.E. Klubo* (Auggusto) monata gazeto por la kolktistoj, en la japana, angla kaj Esperanta lingvoj; adreso: 28, Sinagaúaco, Kanazaúia, Japanujo.

Fluganta Skribo (Novembro) hektografita gazeto ilustrita por la stenografio Duploye-Flageul.

Esperanto (Oktubre) organo de la centro Esperantista "Nova Sento," Santa Fé, 77, Bahia Blanca, Argentino, en la hispana lingvo kaj Esperanto.

La Unuigita Tuthomaro (November) en diversaj lingvoj kaj Esperanto. Abonejo: W. Heydorn, Bahai-Verlag, Hamburg 35, 7½ markoj. De Januaro la gazeto aperos tute en Esperanto.

La Esperantisto (Novembro) 4-paĝa grandformata, gazeto tute en Esperanto; Redakcio: Wien II/1., Postamt 34; jarabono 1 Franko. Enhavo: "La Interna Ideo de Esperanto kaj la dekkvar punktoj de 'l prezidanto Wilson.' de Prof. Theodor Fuchs; "Si vis pacem . . ." de H. Zimmermann, redaktoro de N. Lodzer Zeitung (Polujo); "La Egoista Grandegulo" (Oscar Wilde); "La Vizio de Baltazar" (Byron) Grabowski "Tutmondaj Kulturtendencoj," kaj "Unua Propaganda cirkuletero al la Esperantaj Societoj k.t.p." de D-ro A. Popolan. Tiun ĉe gazeton ni varme rekondas pro la intereso kaj bonstileco de ĝia enhavo.

Esperanto Monthly (Nov. 15.) Contents: "Esperanto and the League of Nations" by Prof. Charles Sarolea, LL.D., Ph.D., D.Litt.—Apparatus for Learning the Correlatives, by Robert Robertson; "Possessive Pronouns," some 40 illustrative sentences. Versajo kaj anekdotoj—Ekzemploj de Aplikado de la U.V. de H. M. Scott; Komercaj Leteroj; Competition for Boys and Girls.

Esperantista Laboristo (Novembro) en la franca lingvo kaj Esperanto, redakcio: 49, rue de Bretagne, Paris (III).

Holanda Pioniro (Novembro) en la holanda lingvo kaj Esperanto. El tiu numero ni sciigas, ke la venonta Universala Esp. Kongreso okazos en 1920 en Hago.

Nederlanda Katoliko (Novembro) en la nederlanda lingvo kaj Esperanto; redakcio: P. Heilker, Hoofdorp (Haarlemmermeer).

Hungara Esperantisto (Majo-Oktobro).—No. 5, unua numero, ricevita de ni de ĉi tiu nova gazeto, oficiale organo de la Hungarlanda Esperanto Societo. Redaktoro: Petro Turzo, Szeged, Szen-Fháromság-utea 30. Jara abono 8k. Redaktata en la hungara lingvo kaj Esperanto.

Nova Tempo (Oktobro).—Nova ciumonata 12-paĝa gazeto en la germana lingvo kaj Esperanto, ilustrita, daŭrigo de la "German-Austria Esperantisto"; jara abono K.15. Administracio Wien VIII. Lerchenfelderstrato 128. Enhavo: "Nova tempo"—Al niaj legantoj—Bulonjo-sur-Maro, tre interesa artikolo pri la urbo kaj Unua Kongreso, de Otto Simon—Wien—Aleksandro de Humboldt—Kroniko kaj Bibliografio, ankaŭ germanlingvoj artikoloj.

JUS APERIS.

| | s. d. |
|---|-------|
| Handbook of the Church Esperantist League ... | 0 4 |
| B.E.S.-a Adresaro | |
| Batalo pri la domo Heikkila (J. Linnankoski) | 1 6 |
| La Botistoj , 5-akta komedio (A. Kivi)... | 2 6 |
| (Finna Biblioteko Esperanta, 1 and 2) | |
| Finna-Esperanta Frazlibreto (H. Salokannel) | |
| Curso Elementar de Esperanto por Saldanha Carreira e Luzo Bemaldo, Lisbon. | 2 0 |

Ronda Demandaro de la Pedagogia Ligo Internacia.

Estimata kolego! — Alvokinte en la unua numero de la liga gazeto "Föhn" al la fondado de la P.L.I., ni volas komenci per la hodiaŭa cirkulero. La respondo al la sekvantaj demandoj certe rezultigas valorajn bazojn por nia internacia interŝango de spertoj.

(1). Kiu postuloj pri la lernreformoj estas speciale gravaj en via lando? Bonvolu nomi verkistojn, gravajn personojn, organizaciojn, ŝatajn arangojn, kiuj rilatas al viaj lernreformoj.

(2). Kiamaniere oni celas atingi ĉe vi la benon de unueca lernejo, foriganta la diversajn arbitrajn specojn de lernejoj kaj la kontraston inter riĉuloj kaj malriĉuloj.

(3). Kiel oni jugas ĉe vi pri

(a) *senpageco de instruo kaj lerniloj*, (b) *helpo al talentuloj*, (c) *forigo de la korpa punado*, (d) *prokrasto de la instruado pri skrib-legado*, (e) *instruado pri manlaboro*, (f) *instruado eksterdoma*, (g) *libervoleco anstataŭ devigo en la lernado*, (h) *forigo de la tro-postuloj rilate al hejmtaskoj*, (i) *plenumo de la lernejaj ordo kaj disciplino per la lernantoj mem*, (k) *forigo de la ekzamenoj*, (l) *lernanta gazeto kaj forigo de la lernolibro*, (m) *kunedukado de geknaboj*, (n) *partopreno de la gepatroj en la lerneja administracio*.

(4). Kiel estas ĉe vi la rilatoj inter lernejo kaj eklezio?

(5). Kiel estas ĉe vi la rilatoj inter geinstruistoj de popollernejoj kaj

(a) *eklezio*, (b) *universitato*, (c) *politikaj partioj*, (d) *geinstruistoj de la mezaj lernejoj kaj gimnazioj*.

(6). Kiel oni intencas arangi ĉe vi

(a) *studadon de la instruantoj*, (b) *instruadon de la gejunularo 13—18 jara*, (c) *prizorgan edukadon por morale endangerigitaj infanoj*, (d) *prizorgan por militistaj georfoj*?
kiuj institucioj konsistas ĉe vi por prizorgo de infanoj ĝis la 6a jaro? (infangardenoj laŭ Fröbel, sistemo de Montessori k.a.)

(7). Multvaloraj estas sciigoj pri

(a) *limigo de la studado de antikvaj lingvoj*, (b) *enkonduko de mondlingvo* (Esperanto), (c) *internacia fako de la instruaj oficistaroj*, (d) *juĝo pri la germana publika instruado*, (e) *higiena kaj senrelegia moralinstruado*, (f) *senedzeco de la instruistinoj*, (g) *instrua plano kaj lernila reformo laŭ senco de novtempa informo (demokratiigo, pacifismo, inkluzive politikan pacifismon*.

Se vi mem ne volas respondi nian ronddemandon, bonvolu ĝin transdoni al personoj, kiuj interesigas pri ĝi.

Post kunmetado de la ricevinta respondmaterialo estas sendota al ĉiu kunlaboranto kopio de rezultato.

Samtempe ni ripetas la peton el la unua alvoko en la Föhn pri sendo de pedagogia publikado, instruaj programoj, lernordo, lernolibroj k.a. Ĉiuj sendajoj estas kolektotaj kiel bazo de internacia pedagogia muzeo kaj devas esti adresataj al la subskribinta prezidanto de la internacia socialista geinstruista unuiĝo. *Vivu la homara interfratigo!*

GEORG MAGER, instruisto, Aschaffenburg, Bayern.

(Detalaj respondeoj el la tuta mondo al ĉi tiu alvoko pruvas al la liganoj la internaciecon de nia lingvo kaj tre kuragigas la bavarajn samideanojn.)

SAMIDEANOJ EL LA TUTA MONDO! — Kiu el vi povas (kaj volas) interrilatigi min kun la fama hindia aŭtoropoeto RABINDRANATH TAGORE? Mi volas ricevi de li aŭtoran permeson por traduki liajn verkojn.

Mi petas ne malšati tiun mian peton. Ni povu ankaŭ ion utilan havi pere de Esperanto. Ĉiujn informojn mi petas sendi al

EDWARDO WIESENFELD, Varsovio (Polujo.) Str. Biala 3.
Aliaj gazetoj represu!

"Esperanto kaj la Ligo de Nacioj."

Notoj el parolado de Profesoro CHARLES SAROLEA, LL.D., Ph.D., D.L.H.

Al publika kunveno en Edinburgo, la 23an de Oktobro, 1919.

Al la vera Esperantisto la estonteco de la Ligo de Nacioj kaj la estonteco de Esperanto intime kunligigas. Mi pensas, ke la ideo de la Ligo de Nacioj estasinda je niaj penegoj, sed ni devas batali kontraŭ multe da grandaj malfacilaĵoj, antaŭ ol ni sukcesos. Kvankam la Ligo de Nacioj estas multe priparolata, mankas al ĝi inspira forto. Ni ne malkuraĝigu pro tio. La klarigoj estas multaj kaj videblaj. Ekzistas laceco post la milito, manko de politika kurago de la subtenantoj de la ideo, la oportunitismo, ec inter la ĉefaj propagandistoj de la Ligo, kaj la nescio kaj iluzioj, eligantaj el la ebrieo de venko. La milito kreis en la mezo de Eŭropo novajn naciojn kaj novan batalon de lingvoj. Ĉiu nacio insistas paroli sian propran lingvon. Ili faris fetiçon el sia lingvo. Oni ne povas eviti la demandon. La Ligo de Nacioj devos decidi, kio estos la diplomacia lingvo de la estonteco. Oni devos konsideri la pretendojn de la franca lingvo, pro ĝia historia uzado, de angla lingvo pro ĝia komerca uzado, de germana, hispana, itala kaj aliaj lingvoj. La malgrandaj nacioj havas siajn rajtojn. La kleruloj en tiuj nacioj devas lerni multe da lingvoj. Kiel oni povas solvi la problemon?

Estas al la eterna kredito kaj merito de Esperanto, ke longe antaŭ la milito, longe antaŭ kiam tiuj problemoj fariĝis tiel akraj, ĝi anticipis ĝin. Mi konas ĉiujn argumentojn kontraŭ artefarita lingvo generale kaj kontraŭ Esperanto precipe, sed mi ankaŭ scias, ke tiuj argumentoj estas bazitaj sur supraja pensado kaj nescio, kaj ke la argumentoj por Esperanto estas pli pezoj ol tiuj kontraŭ.

Esperanto interesas min precipe kiel filozofa studaĵo kaj kiel literatura studaĵo. Sen troigo, mi ne scias multe pli bonaj disciplinoj por la meno, ol la studado de Esperanto. Ĝi estas ideale simpla kaj tute logika. De la unua regulo ĝis la lasta ĝi estas aplikata logiko. Mi povas paroli kiel spertulo pri lingvoj, studinte dek ok lingvojn, kaj mi asertas, ke kiel instrumento por literatura esprimo Esperanto ne havas multe da konkurantoj inter la tiel nomitaj historijs, naciaj kaj naturaj lingvoj. Mi konvinkiĝis, ke kiel rezulto de la milito, ni vidos en la sekventaj kelkaj jaroj grandan antaŭenpuson al la studado de Esperanto, kaj mi do devas kuraĝigi ĉiujn entuziasmajn subtenantojn, en plena fido, per la vortoj: *Antaŭen. Vi faras bonan laboron. Vi akcelas bonan interkompreneigon inter la popoloj. Vi klopodas forigi unu el la plej fruktoportaj kaŭzoj de la milito.*



Church Esperantist League. — The Annual General Meeting of the League was held on Tuesday, November 25th, at the offices of the B. E. A., Hart Street, Bloomsbury, under the presidency of the Rev. A. L. Curry, M.A.

The attendance was representative and the Hon. Secretary presented a most encouraging report of progress and bright prospects. The President and Hon. Secretary were both re-elected for the seventh successive year. Vice-Presidents also were elected and the Committee augmented. The Meeting was interested to learn that the Lord Bishop of Birmingham has consented to be Patron of the next Annual Congress of British Esperantists to be held in that City at Whitsuntide 1920.

La Virino.

Si havas ses jarojn; li havas sep. Oni jus rakontis al ili romanon pri la kavaliroj kiuj ekiradis por serĉi aventurojn.

"Mi estas kavaliro, kaj ni ekiru serĉonte aventurojn," li diras.

"Jes," ŝi konsentas, "vi estas kavaliro, kaj mi estas via fidela kamarado ĉiam helpadanta vin."

Li prenas sian riĉe juvelitan glavon (nesciantaj plenaĝuloj dirus ke ĝi estas nur nuda bastono) kaj ekiras.

"Permesu ke via fidela kamarado helpu vin portante la pezan glavon" ŝi diras, uzante la vortojn en la romano; kaj kvankam la kavaliro iom ĉagrenas, tamen li donas ĝin al ŝi ripetante la respondon el la rakonto:

"Jen, prenu ĝin, mia fidela helpanto."

Post iom de la vojo ili ambaŭ samtempe ekvidas sur la tero persikon; sed la kavaliro ekkuras pli rapide ol ŝi, kaj ekkaptas ĝin.

"Donu al mi" ordonas la fidela kamarado, mi unue ekvidis ĝin.

"Ne; mi unue ekvidis" diras la kavaliro.

Ĉe tio ŝi levas la glavon alten kaj faligas ĝin sur lian kapon.

La persiko falas teren. Surprizo mutigas lin. Poste venas la penso: kia terurajo! granda bastono ĝuste sur la frunton!

Li malfermas la bušon large kaj eligas longan, laŭtan, unutonan krion.

Sed baldaŭ venas la penso: Nura sesjara knabino batis lin, ja sepjaran knabon! kiel honte!

Tuj lia krio forvelkas; li koleras, kaj ekkuras al ŝi.

Si forkuras laŭ triono de rondo. Li atingas ŝin, prenas la bastonon, kaj levas ĝin minace. Sed ŝi timas, ploras kaj forkuras denove laŭ trionrondo. Ree li atingas ŝin kaj levas la bastonon minace. Denove ŝi timas, ploras kaj forkuras laŭ plua trionrondo. Li atingas ŝin, kaj ŝajnas ke kiam li minacas ŝin, ŝi mortos de teruro. Vidante tion, li ree kaj ree celas al ŝi kun la bastono, intence maltrafe, kaj batante tre forte la teron.

"Tio punas ŝin," li diras al ŝi.

La kompatinda kamarado ploregas, kaj baldaŭ la venkinta kavaliro ekiras forlasonta ŝin. Tuj kiam lia dorso turnigas al ŝi, ŝi ekkaptas la surteran persikon. Subite li rigardas posten al ŝi, kaj vidante nur ke ŝi ploregas kaj timegas lin, la gloran viran venkinton, li forlasas ŝin, fiera pro tio ke li ja estas viro, kaj ŝi nur ino.

Tamen, dum lia figuro malaperas, en la okuloj de la helpanta kamarado brilas ruza rideto, kaj ŝia bušo estas plena de la bongusta persiko.

TAGULO.

Folioj el la libro de Johano la Mensogisto.

Vojago sur la Balta Maro.

Antaŭ multaj jaroj, kiam mi estis tre junia, mi farigis maristo, kaj la unua vojago, en kiu mi partoprenis, estis sur la Balta Maro.

Nia Ŝipo, la "Bluebell," forvojagis el Newcastle, transiris la "Nordan Maron," kaj post tre malagrabla vojago, iris sur la suprenomitan maron.

Estas vintro, kaj tre dense la neĝo falas, la vento estas tre akra, kaj mi tute ne povas elporti ĝin, tial mi surmetis mian surtuton.

La vidajo min tre placis, kaj mi amis starri sur la ferdeko kaj ĝin rigardi.

Unu tagon mi staris tiel longe, ke, kiam mi deziris iri al la kajuto, mi tute ne povis movi la piedojn.

"Kio estas?" mi demandis, "Mi ne povas movigi."

"Eble per la frosto vi estas fiksita al la ferdeko," diris mio kamarado, kiu ekpuĉis min; mi falis antaŭen, miaj manoj tuſis la ferdekona, kaj tuj fiksigis per la frosto, ĝuste same kiel la piedoj. Nun mi restas tute fiksita, mane kaj piede, kaj ĉiu ŝipanoj min mokridis.

Fine oni eltrancis la lignon, sur kiu mi estas fiksita, kaj ordonis min iri al la fajro, por degeligi la froston; poste mi neniam staris senmove.

Nur vojaĝis la ŝipo du, tri tagojn en la terura maro, kiam la ŝipestro eksciigis, ke ĝi pli kaj pli malrapidas ĝis fine, kiel mi, ĝi staris tute senmove. Denove la demando, "Kio estas? kio estas!" Ha, bone mi scias: la "Bluebell," mia nuntempa hejmo, estas haltigita per la frosto. Oni mokridis min tiam, kiam mi estas tiele senmovigita, sed mi opinias, ke ili ne ridos pri la haltigado de la ŝipo.

"Malbona sorto!" ekkriis la ŝipestro "kion mi povas fari?"

La ŝipanoj konsilis al la ŝipestro diversajn rimedojn, sed li ilin forpelis.

Car la konsiloj de la ŝipanoj ne plaĉis, mi faris al li proponon.

"Je la cieloj!" tondris li, "Cu vi vere havas la kuragon fari al mi proponon? Kion vi scias pri la afero? for! antaŭ ol mi bastonbatos vin, sentaŭgulo, for de mi, rapide!"

Kiel infano mi forkuris, car li min timigis.

Ĉiu ŝipanoj malsukcesis, ili nenion plu povis fari.


Tiam lia moŝto, la estro de la sentaŭgulo, ordonis al mi plenumi mian proponon.

Unue, mi enslosis en la kajutoj la ŝipestron, maaton kaj ĉiun alian malsukcesinton, kaj komencis mian laboron. Mi malmoligis la gluajon de la carpentisto, per ĝi mi ŝmiris la ferdekona; poste mi jetis sur la ferdekona grenerojn kaj liberigis la kolombojn; dum ili formangis la grenerojn, mi forhakis de la ŝipo la glacion.

Kiam mi finis la hakadon, mi reiris sur la ŝipon kaj mirinde, tuj kiam la kolomboj min ekvidis, ili provis forfugi kaj kun ili portis la ŝipon. Vi ridas je mia rakonto, kial? Per via rido mi komprenas, ke vi ne kredas min.

Ho ve, ho ve, en kia nekredema mondo ni logas! Bone mi povas konstati la veraĵon de la rakonto, car, cu mi ne estis tie, kiam okazis la mirindajo?

Skribita laŭ memoro de
GEO. W. GIBSON, Bedlington.



Verses.

On receiving an invitation to a Lecture on The Nebular Hypothesis.

Hypothesis highly nebular!

(Hypotheses all as a rule are !)

All up in the stars, in cold air above Mars,
And at altitudes even much coolah!

But a star that is very much nearer,
Shines several million times clearer.

It's colour is green, and it's five points are seen,
Giving light round the world to the steerer.

It is proved beyond all hypothetic,
That its power is most highly magnetic;
For it draws all the world where it's flag is unfurl'd,
To a language precise and synthetic.

It will draw all the races of man to
The language that's called "Esperanto,"
So here's to the star that is not nebular,
But a glittering fact!—Esperanto!

HARRISON HILL.

Council Meeting, B.E.A.

Held at the offices of the Association on Monday, November 17th at 6.30, with Mr. C. J. Cox in the chair. The following were present:—Mrs. Waller, Miss Grant, Miss O'Brien, Messrs. Chatterton, Edmonds, Fairmen, Goodliffe, Long, Menteth and Robertson.

Among the items discussed were:

League of Nations Meeting, Nov. 11th.—A hearty vote of thanks was accorded to the organisers of this meeting.

The Magazine for 1920.—The Secretary reported what he had done in this matter and the Council by resolution approved of his action.

Finance Committee.—This Committee presented a report on Mr. Archibald Sharp's proposals (See B.E., Oct., p. 87). It was not in favour of their adoption but recommended alternative proposals for consideration. Its three recommendations appear in next column, and opinions regarding them are invited from the Members of the Association.

Finance Meeting of the Council.—On the suggestion of Mr. Merchant, of Sheffield, it was decided to call a special meeting of Council to discuss the finances of the Association, the date to be January 10th, 1920.

Notice is hereby given that the next meeting of Council will be held on Monday, December 15, at 6.30 in the Offices of the Association, 17, Hart-street, London, W.C.1, and the following Meeting on Monday, January 19, at the same place and time.

AGENDA.

Financial Statement.

Motion to be moved by Mr. Edmonds:

"That all items received by the Secretary up to the date of meeting of the Council be placed on the agenda of the meeting, and that it be left to the Council to decide which items require notice to all Councillors."

Correspondence and other business.

MONTAGU C. BUTLER, Secretary.

EDZIGIS en Lyon, Franclando, la 23an de Septembro, Fraŭlino Madeline Lock el Radstock apud Bath kun Samideano Louis Fournier el Lyon, Franclando.

MORTIS.—F-ino MARY ADA EMERSON, Chatwin House School, Darlington la 9an de Novembro. Fervora Esperantistino, kiu ĉeestis kelkajn internaciajn kongresojn.



Fako de Korespondado Internacia (F.K.I.).

Sub tiu ĉi rubriko oni empresas malgrandajn anoncojn de tiuj el niaj legantoj, kiuj deziras korespondadi kun alilanduloj. Ĉiu anoncanto devas pagi ses pencojn (25 spesdekojn) por trilinia empresajo kiel sube (pli ol tri linioj po tri pencoj por ĉia komencita linio); ĉiu MEMBRO de la Asocio havas la rajton fari unu empresajon senpage. Bonvolu skribi legeble, rekte al la Redakcio.

1037. Mexico City.—S-ro Ernesto E. Guerra, P.O.B. 5212, deziras korespondadi kun larganimaj kaj konstantaj geesperantistoj.

1038. New York City, Usono.—S-ro Armand B. Coign, 2633, Creston-ave., Fordham, deziras koni gesinjorojn interesatajn en internacia asocio por psika enketado kiel helponoj kaj avizantoj. Mine korespondos pri psikismo, nek pri ia temo escepte tiun asacion. P.K. kaj P.M. kolektantej ne ricevos respondon.

1039. Radom (Polujo).—S-ro L. Goldbaum, Lubelska 7, deziras korespondadi kun ĝiulandaj samideanoj.

1040. Liverpool (Anglujo).—S-ro F. Melville Danesford, antaue en Bulawayo (Rhodesia) S. Atriko, atentigas pri sia nova adreso, jene: c/o The Gregg Publishing Co., 21, Harrington Street; li petas senkulpigon rilate respondejojn al leteroj k.t.p. pro la longa vojaĝo Anglujo.

1041. Udine (Italujo).—S-ro Antono Guddalupi, Viale Venezia 45A, deziras interŝanĝi il p.k. kun la tutmondaj gesamideanoj. Li respondas al ĉiuj.

1042. Srinagar (Kashmir) Hindujo.—S-ro J. La Frenais, deziras korespondadi per il. pošt-kartoj kun Eŭropaj samideanoj.

1043. Townsville (Queensland) Australio.—S-ro John Rogers, 6th Avenue, deziras korespondadi kun komencantoj el la Laboristaro ĉiunacia, precipe kun Sud-Amerikaj laboristoj.

FINANCE COMMITTEE.

After discussion of the questions involved by Mr. Sharp's proposals (See "B.E." Oct. p. 87), the Finance Committee at their meeting on Nov. 10th made the following decisions, and members of the Association are invited to express their opinions regarding them.

I. *The Finance Committee is of opinion that no Special Fund should be created, any portion of which would be deducted from the deficit on Revenue account, and thereby reduce the amount payable by the Guarantors.*

II. *That the Finance Committee do not consider that the proposal to create a special fund is necessary; but they recommend that in order to assist the finances of the Association an Hon. Financial Secretary should be appointed, whose duty it would be to make appeals for money in the form of donations to the Association from Esperantists and sympathisers with Esperanto; such donations to be credited to Capital Account.*

III. *That in lieu of Mr. Sharp's proposal No. 4, the Council should recommend to the Annual General Meeting in 1920, that from 1921 onwards the subscription be 10/- per annum for members and 20/- for Fellows.*



The British Esperanto Association (Inc.).

EXTRACT FROM RULES.—"If no objection shall be lodged within fourteen days, the Secretary shall inform the candidate that he is admitted as a member."

CANDIDATES FOR MEMBERSHIP.

MISS ADELAIDE A. BENNETT, Queen's-road, Stonehouse, Glos.; FRANK H. BOLTON, 1, St. Michael's-Alley, London, E.C.3; A. FENNER BROCKWAY, 8 and 9, Johnson's-Court, Fleet-street, London, E.C.4; A. R. FAIRBAIRN, 31, St. Mary's-terrace, Ryton-on-Tyne; ELBERT P. FOTHERGILL, 112, Tachbrook-street, Westminster, S.W.1; FRANCIS S. PITTS-TAYLOR, M.B., Ch.B., 106, Bloomfield-road, Blackpool; JOHN ROGERS, 6th Avenue, S. Townsville, Queensland, Australia; ERNEST J. WATSON, 6, Balcombe-street, Dorset-square, London, N.W.1; HENRY T. WHITE, 23, Willoughby Park-road, Tottenham, London, N.17.

NEW FELLOWS.

Mr. S. JARVIS, Aberdeen; Mrs. EVA MOFFATT, Belfast; Mr. J. G. SIMS, Brighton.

NEW DELEGATE COUNCILLOR.

Mr. E. W. HARRISON, Worcester.

PASSED PRELIMINARY EXAMINATION.

*MISS M. EVELYN ROBERT, Ramsey, Isle of Man; GEORGE M. TAYLOR, Gillingham, Kent.

PASSED ADVANCED EXAMINATION.

P. E. KEMP, Shooter's-hill, London, S.E.18; *THOS. ALEXANDER ALLEN, Montreal, Canada; *J. FRANCIS TALLON, F.A.S.I., Chester.

* Denotes that the candidate has passed with distinction.



1135. Pecavja Rječka (apud Vladivostok).—S-ro Ier. Lieutenant Desider Balog, Camp of War Prisoners, deziras korespondadi kun spertaj, junaj gepropagandantoj pri Esp-ismo; li estas 28-jara hungarlandano, deposito 10 jaroj Esp-isto, nun militkapito.

1136. Lille-Fives (Nord) Francujo.—S-ro F. Lepercq, 67, rue de Lannoy, tre deziras interŝangi scrioze poštmarkojn kun ĝiulandaj gesamideanoj; sed ne faras la unuan sendaĵon. Plezuro korespondos letere kaj pošt-karte kun la gesamideanoj, kiuj povas sendi poštmarkojn al li. Tuj kaj ĉiam respondos.

1137. Budapest, VI. (Hungarujo).—Hungaraj samideanoj deziras korespondi kun ĝiulandanoj, sin turni unue al S-ro Paúlo Balkanyi, Hajos strato 15. II. 2.

1138. Raumo (Finnlando).—S-ro Jalmar Valpio, instruisto de seminario,deziras korespondadi per pošt-kartoj, leteroj kaj poštmarkoj.

1139. Raumo (Finnlando).—S-ro Harnes Lahdenranta (lernanto de liceo) deziras korespondi kun ĝiulandaj samideanoj.

1140. Kingston-on-Thames (Anglujo).—La loka Societo, 20, Orchard Road, arangas letero- kaj pošt-kart- vesperon por fino de Marto. L. kaj pk. estas petataj el ĉiuj landoj. Post tiu dato oni nepre respondos.

1141. Benburb (Co. Tyrone) Irlando.—F-ino Mable Orr, "Derrycreevy" deziras korespondadi kun alilandaj samideanoj.